

PENSEO

N-ro 372

okt. / 2022

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



TEKSADO

Vortoj estas steloj,
kiujn ni eklumigas
aŭ estingas ĉiam.

Ĉu ekzemplo? Ŝpinisto,
teksisto de sonĝoj,
vivo kaj morto.

Antikvaj popoloj al diinoj
atribuis tian oficon:
al Nornoj, Moroj, Parcoj.

Sed la destinon ĉiutage
ni teksas en l' infanaĝo
de l' animo ankoraŭ.

La Leĝo de Amo
kuŝas en la konscienco:
donaco de Dio al ni.

Necesas nur kuraĝo
por ke ni lumigu
la stelon definitivan.

Juiz de Fora, 28/08/2022.

Tiberio Madonna (Italio)



El falsa ledo

Sub ĉi verda ĉielo
el sunaj folioj

miaj pensoj
ankoraŭ volas
vin spiri.
Vi ĝojas
kiam mi suferas
kaj vi suferas
kiam mi false ĝojas.
Kaj mi forkuras de vi.
Kaj dudekkvin horojn tage
estas grizaj nuboj
kiuj daŭras entute
ĉi tiujn dek minutojn en la parko.
Kion mi faris
sume?
Kiu estas konklude mia
kulpo?
Kiu vere— ni vidu bone —
mia nepardonebla misago
kaŭz' origina de via rankoro?
Tio ke mi malfermis
sen ia intenco
kaj sen tion rimarki
mi malfermis
la paĝojn kungluitajn
de via kor' el falsa ledo.

Papos Nascentes (Brazilo)



Donaco

donacon ne ĝin akiru:
ĝin komponu, faru ni
per poezio inspiru
tion plej bonan en ni

al kvarversaj' de l' tercet'

(mia am' de kreska ec'):
 riskas mi eĉ sonet'
 — estonto de estantec'

tercetoj nun sen misfaroj
 la ĉef-verko — mia estim' —
 venas tute sen eraroj
 kreiĝas nun tiu pecet':
 via, la vivo, la rim',
 mia, donaca sonet'!

Seniluziiĝo

simile al Manuel Bandeira*
 ja honte mi poeziumas
 malzorgata seniluzi'
 misvoras libero misa
 trosentemon ploron umas mi

roras kaj grincas tiu poemo
 spaco streĉa (nur vana kodo)
 mortanta kodo nur morsa kodo
 komprenemulo jen silenta emo

tiu surbuŝa kaĉ' el farun'
 ĉu emas poemo al ebri'?'
 tutan plenveron ni kantu plu

— jen kuro-simila poezi'...

*Manuel Bandeira (1886-1968) estas brazila poeto de modernismo iel romantisma. La originalan poemon oni konsideras metapoemo, tio estas, poemo celanta priskribi la proceson mem de beletra kreado.

Klaus Friese (Germanio)



Ĉe la plaĝo

Onklino Lola, onklo Jan
 kun nepo Benjamin,
 kaj ankaŭ pupo pelikan'.
 Renkonto kun destin'.

Ĉe vasta mar', ĉe bela strand'.
 Bantuko en la man'.
 Ferioj por la tuta land'.
 Ripozo estas plan'.

La mildaj ondoj, varma vent'.
 Proksime restu nur!
 Profunda akvo, do atent'!
 En maro mankas mur'.

Amuze estas, flugas temp'.
 Malsekas ĉiuj nun,
 kaj ĉiuj brilas de kontent'
 kaj iras al la dun'.

Tiom da homoj sur la plaĝ'
 kuŝantaj sur bantuk'.
 Ĉiu oleis, brunvizaĝ'.
 Bongustas fruktosuk'.

Bantukojn niajn serĉu vi!
 Rapidu onklo Jan!
 Do serĉu bone, estas tri
 ĉe nia pelikan'.

Ho ve, ekvokas Benjamin.
 La pelikano for!
 Ĝi estas for, ĉu halucin'?'
 Aŭdiĝas laŭta ĥor'.

Serĉado dum la tuta hor'
 Finfine la sukces'.
 Trovita pup', ne estu plor'.
 Prenita sen permes'.

Du fremdaj knaboj ludas nun'
 kun ĉarma pelikan'.
 Sen timo pro sekvanta pun'
 de pupa akompan'.

Ne montras sin la tukoj tri.
 Kien rigardu nin?
 Tre malesperaj estas ni!
 Ja mankas medicin'!

Finfine venas la feliĉ' .
 Laŭorde sur la lok'
 bantukoj tri eĉ kun sandviĉ' .
 Sen tukoj estus ŝok' .



Ĉe la marbordo

La mevoj krias laŭte ĉe marbordo.
 Muĝas la ondoj, dancas sub la vent' .
 Flugas la nuboj haste en akordo,
 kovras la sunon foje kun konsent' .

Homoj promenas pace sur la plaĝo.
 Nudaj piedoj ĉe la mara rand' .
 Pro akraj konkoj gravas la kuraĝo.
 Malmolaj ŝtonoj pikas sen demand' .

Malsato nin molestas dum migrado.
 Bongusta bulko jen en dekstra man' .
 Aŭdiĝas nun terura mokrado.
 Por mevo estas efektiva plan' .


Rapide bulkon ŝtelas ĝi en flugo.
 Ne povas fari prirabita hom' .
 Nur restas plumo blanka kun lanugo.
 Ŝtelisto nun fariĝas la fantom' .

Vegana karotokuko

Se vi volas vi povas, vi baku nun.
 Oleo, sukero, bonfortun' .
 Raspitaj karotoj, sojolak' .
 Pincajo da salo en ĝusta takt' .
 Tritika faruno, citrona suk' .
 Vanilita suker' , ne estas truk' .
 Bakpulvoro plej bone kun tartrat' ,
 aldonita zorgeme kun kantat' .
 Nun miksu kukpaston, kontrolu ĝin.
 Kirlu kulere sen iu maŝin' .

Preparu bakmuldon per bakpaper' .
 Nur sesdek minuta varmega afer' .

Jadranka Miric (Serbio)



Jubileo

Pasis kvindeko da jaroj
 de nia edzeco, ankoraŭ vi
 bonvolegas scii:
 Ĉu vi amas min!

De gepatroj benon ricevis mi.
 Hodiaŭ la benon transdonas ni
 al nia ido benante:
 Estu bonkora kaj bonstata vi,
 Estu vi pia kaj indulgema kiel panjo via ,
 estu vi nobla kaj dankema kara ci.
 Estu mildeco en vivo via, karega filo nia!



Sonĝo

Ardas sunradioj kiel amo mia.
 Ŝvitas mi pro amdeklaro via.
 Forte pelas ĉaron maltrankvila ĉevaloparo
 tra ĉiela blanka nubomaro!

Stelar' ankoraŭ ne aperigis.
 Eĉ tre pala aspektis luno
 kiam mi subite vekigis.
 Ekstere jam, alte staris radiantanta suno.

Ljubo poŝtisto

Hodiaŭ renkontiĝis ni.
 Kara longjara nia poŝtisto, vi
 ĉarmas svelta persono
 kun via malnova biciklo kun akra sono!

Etendita mano lia,
 ridema brunokula viro.
 Ankoraŭ konata parfummiro!
 Rimarko fulma antaŭ brakumo nia.

Estas bone vidi vin!
Pasis tiom da jaroj!
El multa juna amoparo
maleblas ia komparo!

Vin neniam ni forgesos —diris mi.
Estis vi pleje atendata poŝtisto!
“Pro miloj da skribitaj leteroj” respondis li .
Karmemoro al juneco , disiĝis ni kun tristo !

Provo

Vizito decida.
Maltrankviliĝis mi .
Iri inkognito
aŭ alvoki vin. Ida
belnomo via. Plaĉas al mi.
Somere malfacilas iun viziti.
Multaj ferias por ripoziĝi.
Multaj persone emas iun ajn eviti
por ke ili deziras rapide psike resaniĝi.
Iuj homoj similas al gajaj paseroj
senlace tutĝoje daŭras ĉirpi ,
Iuj kiel lacertoj sur varma ŝtono
volas sian korpon per sunbaterioj plenumi
aŭ gajni brunhaŭtkoloron Do .elektas longe
sunumi.
Ho tiom da obstakloj. Mi rezignis
restas mi hejme.Tamen mi provis!

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Hejmloko

Ho la loko ĉarma jen de foro,
la herbejo verda laŭ memoro.
Estis mia hejmo plenfabela
kun la infanaĝa tempo bela.

Kara panjo zumis tre tenere,
melodio ŝvebis tutlibere.
Jen resonas ĉiam ŝia voko,

kiu logas min al la hejmloko.



Ivanichka Magharova (Bulgario)



Paŝoj

Trans la fenestro
pala lun' transrigardas.
Animo ĝemas.

Nokt' senstela. Lun' .
Solecaj birdoj vekas
min en la sonĝo.

Lun' kaŝrigardas
en vunditan animon.
Doloro kriaas.

Siringa nokto
liton mian plenkovras.
La luno ridas.

Kaŝrigardas lun'
en ŝian tristan koron.
Steloj estingiĝis.

Sensubira lun'
en fenestr' kaŝrigardas.
Ho, lunleviĝas.

Filino de la Balkano

Mi estas kiel infano timema
kiam miajn sentojn
mi devas malkaŝi.

Mi estas forta kiel tigro,
kiam mi devas mian amon gardi.

Kial senbrida ĉevalo
mi estas kiam io

mian liberecon deziras uzurpi.

Kiel antikva kverko mi estas
kiam mi gardas mian fidon.

Fiera —

Mi estas filino de la Montaro!

Ángel Arquillos (Hispanio)



Gutoj da akvo faras grandan maron,
kaj eroj da amo faras la homaron.

Rita MKrtĉjan (Armenio)



La trajno el infaneco

Kiel oni diras, ĉio en nia vivo estas ligita kun
iu rememoro, estu lando, urbo, homo, kanto,
eĉ la nomo, aŭ aromo de floroj.

Kompreneble, se ĉi-tio restis en "lando", kiun
ni nomas Pasinteco.

Ĉi-tiuj modestaj belaj floroj, kiujn jam tre ofte
ni ekvidas en stratoj, en ĝardenoj, en kortoj,
estis kaj estas saluto el mia infaneco.

Kiam ni, per trajno veturadis somere en
Patrujon de mia patrino, en stacidomo mi
unuan fojon eksentis ĉarman aromon de
"nokta belulino" (nomo de la floroj).

Poste, la florojn plantis mia patrino, kaj dum
la vesperoj mi admiris pri tiel konataj karaj
diverskoloraj "ĉapeletoj".

Trapasis tempo, vivoj, ŝanĝiĝis landoj, urboj,
loĝejoj, sed pakaĵo de la rememoroj ĉiam estas
kun ni.

Nun estas ebleco planti florojn, pri kiuj ni eĉ
ne aŭdis antaŭe, kaj en nia urbo ni vidas
florojn, kiuj ĝis tio renkontis nur en ekzotikaj
landoj.

Kaj mi, kiel iam mia patrino, provis planti la
semojn de "Mirabilis" en mia balkono.

Mi ne sciis, ĉu la floroj kreskos en florpotoj aŭ
ne.

Sed, verŝajne miaj rememoroj havas fortajn
"radikojn".

Jam ne ekzistas la stacidomo, ne ekzistas la
trajno kun memorinda direkto, tamen...restis
aromo, aromo de mia kara infaneco.



Darina Ŝevĉuk (Ukrainio)



Bluso por animo

La voĉo raŭka, milda bariton',
Vesperkviet' konsolis nin kaj ligis.
Solece sonis arda saksofon',
Malplenon de l' animo ĝi plenigis.

La blus' vespera vokis al la for',
Karesis ĉiun mian revon ame,
Donacis varmon, lumon al la kor' —
Kaj kunos ni eterne kaj ĉiame...

Verŝitaj sonoj kaj velura ton' —
La melodi' de amo sonas forte.
Nur mi kaj ĝia moŝto — saksofon',
Kaj ĉio kompreneblas duonvorte...



Mistera melodio ree sonas—
Ĝi venis la animon de l' pase'.
Sed kiu ĝiajn belajn notojn konas,
Finregistritaj iam en sol-kle'?

La melodio flugis alte kaj senĉese,
Verŝatis dolĉe en la kor balzam',
Animo kantis en ebri' karese
Kaj fidis viajn vortojn pri la am'.

Min ne forlasas rememoro mia—
Leĝeran bluson ludis saksofon'.
Solviĝis ni en la muzik' magia—
Kaj fluis mi kun vi en unison'.

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Alma Jaku



La milito kaj la paco

Mia filo, malgranda, ludas per armilo-ludilo,
Dum la granda trafoliumas "Milito kaj Paco"
En TV mi aŭskultas ke en Ukrainio ĉiuj
civitanoj

Estas alvokitaj al armeo, maljunuloj kaj infanoj,
same!..

La granda filo estas dek ses jara
Mi imagas sur liaj freŝaj ŝultroj armilon
La griza fumo kaj la bruliga aromo de la pulvo
Ellasas sonojn en la ĉambro, en la korto, kiel
kompano!

Plendolora kurento trapasas mian korpon
Ĉu mi povas konduki mian filon al la milito
Sur ties delikataj ŝultroj mi imagas fusilon
Li diras: ne ploru, jen mi estas, fariĝis mi jam
viro!

Dum la jarcentoj la Milito diras al la infanoj
Fariĝi viroj antaŭtempe, ĉar la Milito
demandas virojn
Dum la patrinoj preĝas unuafoje ke la infanoj

Dum la milita tempo kresku iom pli malfrue!

Per miaj lipoj mi revivigas vin

Vi kapon levas, ien alie algapas,
Ĉiam vin ŝajnigas kvazaŭ min ne konas,
Ĉi tiu povra instinkto vin perfidas,
Senvole, kiam vi la kravaton tuŝas.

Mi kaplevas, okulridas vin,
Ĉar mi ja scias ke mi allogas vin
La paroloj ne bezonatas, ambaŭ ni ja scias,
Ĉiam ĉi tiu milito same finiĝas.

En via kapo ne estas ja alia penso,
Krom pri la blankeco de mia korpo,
Estas vintro, viaj manoj tremas,
Pli varme ol ĉe la forno pri miaj mamoj vi
meditas!

Vian hararon sur miaj fingroj mi havas,
Apud mi subvoĉe vi anhelas,
Troa mem la ĉemizo ŝajnas,
Rigardante ĉirkaŭen, lokon por ĝi vi ne trovas

Se okazos ke vi falu en la riveron Drin
Pro la necerteco kion vi nomas emocio,
Per miaj lipoj mi revivigos vin,
Mi vi tiros al mi por fali sur mia abismo,



Kiel la rivero aŭtune

Mi volas vin nun sur mia korpo,
Por ke mi pesu ĉiun vian enspiron,
Al la plektita haro engutas la ŝvito,
Kiel pezas la roso, matene surherbe,

Okule demandu min, ĉu min amas aŭ ne?
Kaj mi ekridos tutafekte,
Por suspektigi ĉiujn viajn nervojn

Neniam vi komprenos kiomforte krevigis min.

Mi estas plenplena je vi tra la vejnoj,
Ŝvela kiel la rivero Drin aŭtune.
Sur mian boaton eniras via sango,
Kaj mi mem dronas ĉie esperante!

Por la amo pruvoj ne bezonatas,
Sufiĉas ja la okullumo kiam vi min rigardas!
Kiel la luno sur Drin refraktiĝas,
Revenas kaj per brilo min ebriiĝas!

Mi estas la maro, la luno, la rivero,
Fronte al tiu vivplena rigardo,
Mi dancas kiel la lumo sur la akvo,
Mia tero kaj ĉielo vi restas!

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Fan Chengda (1126-1193)

—laŭ melodio *Silk-lava roĵo*

Sur kamparo okcidenta
maturiĝas riz' kun bonodoro.
Ene de la heĝo el hibiskaj branĉoj
kreskas la bambuoj de verd-koloro
sveltaj, longaj, kaj flav-verdaj fruktoj
sur la branĉoj svingas sin en ventpetolo.

Matennebul' humidas en aŭtuno.
Je tagmezo kun maldensaj nuboj
oni sentas sin jen friske sub la suno.
En vetero tia oni ne bezonas ja ombrelon
por sin ŝirmi kontraŭ la sunlumo.

—laŭ melodio *Memoro pri palaca knabino*

Angul' de etaĝdomo arbombrita
videblas jen malklare.
La ombr' de balustrad' projekciiĝas

sur orientan ĉambron pale.
La luno en eosto lumas.
Dum tago ventas, rosas malavare,
abrikotfloroj kun burĝonoj
disfloras ja neĝblanke mare.

Tra densa nebulfum' aŭdeblas
klepsidra falgutad' plorsona.
Lampmeĉo portas bruligaĵon
kaj l' buduaro monotona
malhelas inter pendkusenoj.
Momenta song' belbona
kondukas min al la tereno
pejzaĝa sude de river' impona.

Yang Wanli (1127-1206)

—laŭ melodio *Proksimiĝas bona afero*

Lunlumo brila ne eniris
kabineton mian trafenestre.
Unue l' florĝardenon
prilumas ĝi penetre.
Ne ĝi malemas resti
en mia ĉambro, sed en bambuaro
ja baras ĝin obstine tre.

Nun estas la dektria de monato
lunlum' jam brilas kiel blanka jado.
Ĝi ne prezentas la plej belan lunpejzaĝon,
la plej mirinda dumaŭtuna luno-rado
aperas je l' dekkvina aŭ la deksesa
de l' lunmonato ja en akurato.

Yan Rui (?-?)

—laŭ melodio *Aŭguristo*

Mi ne ŝatis prostituitecon
nur pro destinita la fatalo.
Estas ja fiksita tempo
por disfloro kaj florfalo.
Mia sort' dependas de l' printempo
kiu min favoros per bonfaro.

Devas mi forlasi la prizonon,
kiel mi plu povus vivi tie pace!
Iutage se mi havos freŝajn florojn

ornamitajn sur la kapo plaĉe,
ne demandu al mi,
kien iros vivi mi aŭdace.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Su Shi (1037-1101)

—*Laŭ melodio Shuidiao-Getou*

—Kiam klara l' luno estas?
Demand', kun vin', alĉiele:
—Por palacoj volbe, en kiu
jaro estas ĉi-vespere?
Mi volus rajdi venton tien;
sed mi timas, ke l' jad-kasteloj
alte estus fridaj vere.
Ŝi dancas kun sia ombro*:
—Mi, pli bone, 'stas surtere!

Lumas, tra la domoj de tiuj
nedormaj, hele.
El rankoro? Kial
rondas vi je homdisiĝ' prefere**?
Luno povas pleni aŭ arki;
homoj feliĉas aŭ tragikas:
'niam perfektas afere.
—Ni ĉiuj longvivaj 'stu
diste, kun faz-ĉarm', espere.



*En ĉinaj poemoj, ofte oni ne esprimas klare la subjekton de la frazo(j). Ĉi tie la tradukinto enmetas la vorton 'Ŝi', kiu aludas antikvan virinon Chang-E. Ŝtelinte la magian drogon de sia edzo, ŝi estis portita de magio al la luno; kie ŝi solece vivis por ĉiam.

**En la originalo la vorto 'vi' estas mankinta subjekto, kiu aludas la lunon. — Per simbolecaj flikaĵoj ('Ŝi', ne rekte Chang-E; 'vi', ne rekte la luno) ni volus sugesti,

ke oni devas pene kompreni la ĉinan gramatikon plene en kunteksto, aparte je poezio, eĉ se iu subjekto estas forlasita aŭ kaŝe ŝanĝita.

Anonima

Eliro de la Luno

*Antikva poemo el la lirikoj de Chen-regno
(ĉ. 841-479 a.K. en la dinastio de Orienta Zhou)*

Elen lun' ekhelas.
Karulin' belegas,
sveltas kaj piedas.
Mia kor' tristetas.

Elen lun' tre helas.
Belulin' ĉarmegas,
sveltas kaj paŝetas.
Mia kor' ekpezas.

Lume l' lun' aperas.
L' amatin' flamas,
sveltas kaj moderas.
Mia kor' mizeras.

Rimarkoj:

La originala poemo adoptas versojn de po nur 4 silaboj, dum la esperantigitaj versoj uzas 6 silabojn; t.e., la proporcio inter ĉinaj kaj esperantaj silaboj estas 1:1.5 rigide.

Plie, la tuta poemo sekvas antikvan stilon tradician de plurfoj-ripeta kantado (aŭ popola ĉantado) pri preskaŭ samaj temoj kaj sentoj per sinonima esprimado. La originalo uzas eĉ nur unu rimon tra la tuta verko; dum en la traduko, tio ne povas esti reproduktebla plene. Malgraŭe ni penegas trovi rimedojn por plej precizaj kaj ĉanteblaj versoj kun alta fideleco.

Elĉinigis



Licius (Ĉinio)

^^^

Liu Zihui (1101 - 1147)

Memoro pri la ĉefurba vivo

Li Sisi, en juneco bonzineto, poste geĵŝo
belega, sin prezentis en ĉefurbo vivoplana.
Sed bedaŭrinde, ŝi kaj maljuniĝis kaj
velkiĝis,
dronante en la vagaborda vivo forte splena.
Paliĝis l' orfadena vesto kaj klakilo, kiuj
la koron iam ĉarmis de la reĝo fenomenena.

Lu You (1125 – 1210)

Aŭtunaj pensoj

Avido pelas homojn kiel mil bovoj impetaj,
Prefere, kiel sablomevo, mi ĉi-monde vagas.
Senfare mi ektrovas tagojn jare longaj; kontraŭ
Afero, kia ajn ĝi gravas, mi ebrie agas.
En lavbatado l' luno super la strateto sinkas,
Platanoj skufaligas la aŭtunon en hejmlando.
Ĉu mi, kaduka, povus supreniri altan turon
Por arde filozofi, kiel Yuanlong* aspiranto?
**Yuanlong: alinomo de Chen Deng, kiu estis el
la tempo de la Tri Regno (220 – 265) kaj ĉiam
nutris la aspiron fari bonon al la mondo kaj
kompati la popolon.*



En matena vento la umeoj ekdisfloras,
kiel neĝamasoj, sur ĉi montoj en la foro.
Kiel povus mi fariĝi milmil admirantoj,
por ke tiuj ĝuu la belecon de po floro !



Fan Chengda (1126 – 1193)

Familioj en vilaĝo

Prizorgas kampon tage kaj teksadon nokte
faras,

Vilaĝaj gejunuloj la aferojn mem preparas.
Genepoj, pri ŝpinado kaj kultivo nun obskuraj,
Por lerni melonoplantadon ĉe morusoj staras.

Elĉinigiŝ



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-NAŬA

Zhi la rabisto

§29-02

Zizhang demandis Man Goude:

“Kial vi ne kulturis vin konformigante la konduton al la virto? Se vi ne konformigas la konduton al la virto, vi ne ĝuos alies fidon. Sen alies fido, vi ricevos nenian oficon. Ricevante nenian oficon, vi akiros al vi nenian profiton. Vidate ĉe tiu ĉi lumo, la justeco ja povas alporti al la homo famon kaj profiton. Eĉ se iu oficisto rezignas la famon kaj la profiton, se li nur faras al si konscienc-ekzamenon, li certe trovas tute nebla por li konduti sen la humaneco kaj la justeco eĉ en unu tago!”

“Tiu, kiu havas nenian hontosenton, povas facile riĉiĝi; tiu, kiu estas lerta en flatado, povas facile akiri al si altan postenon. Tiu, kiu akiris al si la plej bonan famon kaj la plej grandan profiton, estas probable persono senhonta, kiu ĝuas alies fidon pere de flatado. Vidate ĉe tiu ĉi lumo, la flatado ja povas alporti al la homo famon kaj profiton. Eĉ se iu oficisto rezignas la famon kaj la profiton, se li nur faras al si konscienc-ekzamenon, li certe trovas, ke li ja kondutas konforme al la denaska naturo!”

“Iam la tiranoj Jie kaj Zhou estis monarkoj, kiuj posedis la riĉaĵojn de la tuta

mondo. Sed se vi nun diras al sklavo aŭ servisto, kiu okupas malaltan pozicion, ke li kondutas kiel Jie kaj Zhou, li certe ruĝiĝos de honto sed interne ribelos, ĉar eĉ la homoj de plej malalta pozicio malestimas Jie kaj Zhou. Aliflanke, Konfuceo kaj Mo Di estis siatempe ne pli ol malriĉaj simpluloj, sed se vi diras al ministro, ke li kondutas kiel Konfuceo kaj Mo Di, li certe tuj ŝanĝos sian mienon kaj humiliĝos, ĉar li estimas tiujn verajn saĝulojn, eĉ se ili okupas malaltan pozicion. Tial, la potenca imperiestro ne nepre estas nobla kaj estiminda; la malriĉa simplulo ne nepre estas malnobra kaj malestiminda. La nobleco kaj malnobleco de la homoj dependas nur de la beleco kaj la malbeleco de ilia konduto.”

Man Goude diris: “La malgranda ŝtelisto estas kaptita, dum la granda rabisto estas respektata kiel princo aŭ duko, de kies patroneco dependas la virtuloj. Antaŭe, kiam Xiao Bai, la duko Huan de la regno Qi, mortigis sian fraton kaj edzinigis al si sian bofratinon, Guan Zhong servis kiel lia ministro. Poste, Tian Chang mortigis la dukon Jian de la regno Qi kaj faris sin la nova reĝo, Konfuceo akceptis la monon, kiun donacis al li la nova duko. Iuj homoj kondamnas la dukon Huan kaj Tian Chang kiel malnoblulojn, sed mem agas en ankoraŭ pli malnobra maniero. Tio montras, ke iliaj paroloj kaj iliaj agoj estas en militado interne de ili. Kia absurda konflikto! Tial estas dirite en antikva libro: ‘Kiu estas malvirta? Kiu estas virta? Sukcesa malvirto estas nomata virto, malsukcesa virto estas reduktita al malvirto.’”

Zizhang rimarkigis: “Se vi ne kulturis vin per praktikado de la bona konduto, tio rezultigus grandan konfuzon al la homaj interrilatoj. Tiam troviĝus nenia mezurilo por determini la intimecon kun la parencoj proksimaj kaj malproksimaj, nek normoj kaj formalajtoj por diferencigi la noblecon de la malnobleco, nek ordo sekvenda inter la pliaĝuloj kaj la plijunuloj. Sur kio do la homaj

interrilatoj estus bazitaj rilate la reganton kaj la regaton, la patron kaj la filon, la edzon kaj la edzinon, la pliaĝulon kaj la plijunulon, la intimulon kaj la neintimulon?”

Man Goude refutis: “Kiam la reĝo Yao mortigis sian unuenaskitan filon kaj la reĝo Shun ekzilis sian duonfraton, kian valoron do tiam havis la parenceco? Kiam la reĝo Tang de la dinastio Shang ekzilis sian suveremon Jie de la dinastio Xia kaj la reĝo Wu mortigis la reĝon Zhou de la dinastio Shang, kie do tiam kuŝis la diferenco inter la nobleco kaj la malnobleco? Kiam Wang Ji estis surtronigita anstataŭ sia plej aĝa frato kaj la duko Dan de Zhou murdis siajn du pli aĝajn fratojn, kie do estis la ordo sekvenda inter la pliaĝuloj kaj la plijunuloj? La konfuceanoj estas hipokritaj en siaj argumentoj, kaj la moistoj predikas fratecan amon inter la homoj. Ĉu estas eble starigi la decan ordon por ĉiuj homaj interrilatoj?”

“Cetere, vi nun ĉasas la famon, same kiel mi la profiton. Sed en efektiveco la famo kaj la profito konformas nek al la racio, nek al la Taŭo. Mi siatempe diskutadis kun vi en la ĉeesto de s-ro Sengeneco, dirante: ‘La vulgarulo mortas pro la riĉaĵo, la noblulo sin oferas pro la honoro. Kvankam ĉiu el la du havas sian propran manieron ŝanĝi siajn sentojn kaj difekti sian veran naturon, tamen ili ambaŭ egale forlasas tion, kion ili devus fari, kaj sin fordonas al tio, kion ili ne devus fari, eĉ je la kosto de la vivo.’”

“Kaj tial, kiel oni diras, anstataŭ agi kiel vulgarulo, vi devus sekvi vian propran naturon; anstataŭ agi kiel noblulo, vi devus obei la naturan leĝon de la evoluado de la estaĵoj. Ĉu la vojoj estas rektaj, ĉu malrektaj, lasu la aferojn disvolviĝi en sia propra maniero. Turnu vian observadon al ĉiuj direktoj kaj prenu ĉion en konsideradon; ŝanĝiĝu aŭ pereu kun la ŝanĝiĝantaj tempoj. Farante jesigon aŭ neadon, tenu vin je tio, kio regas la ŝanĝiĝojn; memstare plenumu vian propran volon; antaŭeniru aŭ retiriĝu kune kun la Taŭo. Ne

forlasu la vojon de la virto, nek akcelu viajn humanecon kaj justecon, por ke vi ne perdu vian veran karakteron. Ne faru klopodojn pro riĉaĵoj, nek oferu vian vivon pro viaj sukcesoj, por ke vi ne difektu la leĝon de la naturo.

“La lojaleco kostis al Bigan la koron kaj al Wu Zixu la okulojn; la fideleco kondukas al la katastrofa atestado fare de Zhigong ĉe la juĝejo kontraŭ sia patro, kaj al la tragika sindronigo de Wei Sheng en la ŝvelanta riverakvo; la honesteco detruis la ermiton Bao Jiao, kiu preferis morti kun sia kadavro sekiĝinta ĉe arbo, kaj la kronprincon Shen Shengdi, kiu preferis sin dronigi en rivero, ol sin defendi pri sia misakuziteco; la justeco kaŭzis, ke Konfuzeo ne povis vidi sian mortantan patrinon, kaj ke Kuangzi ne povis viziti sian patron dum sia vivo. La supre menciitaj estas historiaj faktoj komune konataj en la tagoj de niaj pli aĝaj generacioj. Ili estas ankoraŭ ofte parolataj temoj en nia nuna generacio. Oni ĉiam opinias, ke ĉiuj kleruloj devas konformigi siajn parolojn al la justeco kaj honestigi siajn agojn. Jen la kaŭzo, kial la malfeliĉo okazis al ili kaj detruis ilin ĉiujn.”

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

PLENA LUNO

— laŭ ĉinesko *mallongigita melodio magnolia*

Plena luno
ĉiele de aŭtuno
radias jen
tenere kun dolĉa ben’.

Oni festas,
en korto nokte restas
kun te’ kaj vin’
ĝojante kune sen fin’.

**Mallongigita melodio magnolia (ĉine: jianzi mulanhua): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

JEN

— laŭ ĉinesko *dekses-silabo**

Jen
nia landa fruktĝarden’
prosperas
kiel la eden’.

Jen
hele harmonia scen’
inspiras
nin kun korseren’.

Jen
pompa la mondpacsolen’
pasias
por homara ben’.

**Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforna poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa (x=senrima)*

Nove brizas

— laŭ ĉinesko *flirta kanto**

Festu, festu
kaj fidela restu!
Kristnaskiĝ’ kun beno
estis sankta veno,
Nove, nove
brizas ĉie blove.

Verdondo

— laŭ ĉinesko *flirta kanto**

Ludo, ludo
helpas al la studo.
Ŝatas mi poemi

dum surlage remi.
Mire, mire
verdondas inspire.

**Flirta kanto (ĉine: Tiaoxiaoling): ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

Jadranka Miric (Serbio)

Servu al popolo

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Intencis
mi skribi, sed pri
kio? Tiom da temoj
el mond' dividita fi.
Ĉu konsentas vi?

Daŭras
varma somero
en suda hemisfero
jam aŭtunas. Espero
senfinas. Vero.

Ĉi -jare
tre seka kampar'
timigis malriĉulojn.
Ĉu savos nin la ŝipar'
plena de grenar'.

Memoras
ni pri kovim ke
disdivido maljustis.
Ĉu ĉio ripetigis? Ve!
Mondo ŝanĝas tre!

Kiel ni
vivos sen esper'?
sen ĉiuj homaj ecoj?
Velkas la monda prosper'.

Briks solvas afer' !

Karmemore

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Aŭtune
varma veter'
kun sunplenaj semajnoj.
Memoras min pri somer'
pro suna vesper'.

Venteto
milde karesas
vian grizan hararon.
Vangojn tenere tuŝas.
Lipojn kisetas!

Alloge
alvokas min
por fari la samon. Ho,
sopiron por vidi vin
sed okazis fin'.

Kvar longaj
jaroj sen vi. Ve.
Neniu kulpas. Vivo
estas tia, plena de
sufer' tut' monde.

Aŭtunajn
florkronetojn vi
meritis, franjo mia .
Amo regis inter ni .
Pace dormu vi!

**Sopir-al-sudo (ĉine:yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm

